# AVANCO

2/97

Majo-Aŭgusto
(IX-a jaro, Nro. 1)

Oficiala Organo de Kuba Esperanto-Asocio

ENHAVO

Festparolado okaze de la 18a datreveno — 3 - 6
*Julián Hernández Angulo*

Omaĝo (poezio) — 6 - 7
*Juan Lázaro Besada Toledo*

Havano vokas — 8
*Maritza Gutiérrez González*

Resumo de Universo (hispanlingve) — I - IV
*Juan Ramón Rodriguez Gómez*

Mozaike — 9
*Alexis Otero Castellón*

Ok jara indekso de AVANCO — 10 - 15
*Juan Ramón Rodriguez Gómez*

Esperanto en Ameriko — 16
*Juan Ramón Rodriguez Gómez*

# Estimataj:

Jen la unua numero de la naŭa eldonjaro. Ĉi-kaze kun kelkaj specialaĵoj:

-Indekso de **AVANCO** dum ĝia ok jara vivo.

-Kvarpaĝa hispanlingva suplemento.

-Esperanto en Ameriko (nova rubriko),

-ktp..

Mia sugesto? Legi, analizi kaj taksi ĉion; sed, ĉefe: paroladon de Julián Hernández Angulo, nia Prezidanto, okaze de la 18a datreveno de KEA.

Via redaktoro,

Alexis



# NACIA ESTRARO

***Julián Hernández Angulo**
Prez.. Atentas plenumon de ĉiuj taskoj kaj fakoj.
***Maritza Gutiérrez González**
Ĝenerala Sekr.. Kontrolas internan agadon.
***Alberto Rodríguez Pineda**
Financoj, k. administrado de la Centra Oficejo.
***Héctor Jiménez Batista**
Instruado k. ILEI-Sekcio.
***Juan Ramón Rodríguez Gómez**
Intern. kaj Pub. Rilatoj, Historio, Bibl. k. Libroservo. Ĉefredaktoro de **Universo.**
***Pedro Fernández Rodríguez**
Kulturo. Artaj k. klerigaj aranĝoj.
***Alexis Otero Castellón**
Informado. Ĉefredaktoro de **Avanco** kaj **La Noktuo**

Komisiitoj

***Martha Alonso Gutiérrez**
Turisma agado
***Juan Lázaro Besada Toledo**
Atento al verkistoj.
***Alberto García Fumero**
Scienco kaj tekniko.
***Miguel A. González Alfonso**
Membroj subtenantoj.

**IX-a jaro, nro. 1 (2/97, maj.-aŭg.) / Aperas 3 foje jare / Eldonas: Kuba Espereanto-Asocio / PF.: 5120; 10500 Havano, Kubo / Telefonnumeroj: 40-1364 kaj 40-4484 / Fakso: 53 7 33 87 29 / Ĉefredaktoro: Alexis Otero Castellón / Grafika aranĝo kaj kunredakto: Juan Ramón Rodríguez / Kunlaboris: Julián Hernández, Juan Lázaro Besada, Maritza Gutiérrez kaj Roberto Molina / Prezo: 1:00 CUP (enl.), 2.00 NLG aŭ 2 irk. (eksterl.), pagendaj al KEA-konto ĉe UEA: keaux-u / Ĉiuj rajtoj rezervitaj / Reproduktado permesata (indiki fonton k. sendi du ekzemplerojn al la Redakcio).**

# FESTPAROLADO OKAZE DE LA 18a DATREVENO

***La 16-an de junio, KEA fariĝis dek ok jara kaj la kuba esperantistaro festis tiun datrevenon tra la tuta lando. La centra aranĝo akazis la 14-an de junio en la sidejo de nia Asocio en Centro Havano, kun la ĉeesto de Jacinto Granda, vicprezidanto de la Kuba Instituto pri Libro kaj Wihelmo Lutermano, germana membro de KEK (Komunista Esperanta Kolektivo).***

***Nun, AVANCO profitas la okazon por reprodukti la paroladon de Julián Hernández, KEA-prezidanto, en tiu okazintaĵo.***

Estimataj Invititoj:
Estimataj Samideanoj:

Ofte la ĉiutaga laboro kaj la vivopremo ne permesas al ni rimarki kiom rapide la tagoj fariĝas semajno, semajnoj - monato, kaj monatoj - jaro. La tempo jen surprizas nin, jen kuras apud ni kvazaŭ maltrankvila infano kiu montras sin petolema kun niaj vivoj, tamen, malgraŭ la asertoj, ni, pensantaj homoj, metas ĝin je nia dispono kaj diversmaniere profitas ĝin.

Post du tagoj, nia kara Kuba Esperanto-Asocio fariĝos dek ok jara kaj hodiaŭ, kiam ni decidis festi ĝin, estas oportuna momento por pensi laŭtvoĉe pri la agado farita dum la pasinta periodo.

Nepre ni devas analizi kiom multe ni plenumis niajn celojn kiel asocio, kiom multe ni avancis kaj kio ankoraŭ mankas al nia agado survoje al daŭra perfektiĝo.

Dum la jaro, nia membraro rondiris la ciferon de 850 naciskale konsiderante tiujn, kiuj pagis la kotizon. Ni konscias ke nialande estas pli da esperantistoj kiuj laboras kaj aktivas inter ni, tamen ili ne kotizas ĝustatempe. Ni venigu tiujn esperantistojn kiuj estas iom for kaj pagigu ĉiujn ĝustatempe, tiel ke nia membraro pli altiĝu.

Malgraŭ la malfacilaj cirkonstancoj, nia instruantaro faris grandajn strebojn por instrui la lingvon al interesitoj per regulaj kaj per koresponda kurso tiel ke ili konatiĝu kun la bazaj konitaĵoj de nia kara lingvo, enkorpiĝu al nia movado kaj fariĝu bonaj esperantistoj, plej grava atingo ĉi kampe estis la disvastigo de la movado en Cienfuegos kie nun lernas Esperanton pli ol cent personoj.

Niaj dimanĉaj radioelsendoj per **Radio Habana-Cuba**, niaj naciaj organoj **AVANCO** kaj **La Noktuo**, niaj provincaj bultenoj, niaj oftaj novaĵoj en naciaj kaj provincaj radiostacioj kaj ĵurnaloj, niaj ekspozicioj, niaj eventoj kaj nia daŭra parolado kun kolegoj, familianoj kaj amikoj kiuj ĉirkaŭas nin, garantiis relative fruktodonan laboron en la sfero informado. Sendube la agado en tiu laborsfero estas nia daŭra prioritato ĉar aliel ni ne varbos novajn interesitojn, ne gajnos novajn amikojn kaj ne

trafos la aŭdsentojn de tiuj kiuj ne scias kaj pretas scii, de tiuj kiuj scias kaj volas pli scii kaj de tiuj kiuj estas kaj bezonas pli da informoj kaj argumentoj por pli bone aktivi kaj esti.

Sojle al la dudeka jarcento, ne eblas ke ni komforte fermu nin en nia belsonora domo por ĝui solaj la Zamenhofajn sonojn kaj idealojn.

La senĉesa laboro de tiuj kiuj bone scias la gravan rolon de kulturo inter ni kaj ke ne eblas antaŭeniri preteratentante ŝlosilajn vidpunktojn, ĉirilate ebligis la alproksimiĝon de nia esperantistaro al la kulturo kaj historio de nia movado.

Kelkaj el niaj plej karaj kaj spertaj aktivuloj eĉ produktis kulturon pere de siaj artaj talentoj. Internaciaj, naciaj, regionaj, municipaj aranĝoj kaj rekontiĝoj, same kiel alispecaj forumoj atestas kiom pravaj kaj firmaj estas niaj paŝoj ĉisfere. Pere de Esperanto, ni montris kaj montras al la internacia Esperanto komunumo la riĉan kulturan valoron kaj senton de nia popolo kaj de Latinameriko.

Fumero, Georgina, Besada, Maritza, Juan Ramón, Héctor, Pedrito, Norberto, Alexis kaj kelkaj aliaj, noble kaj plezure ade puŝas la ĉaron kiu prestiĝigas nian Asocion. Ni daŭre stimulu laboron tian inter nia membraro ĉar nur tiel nia movado atingos superajn ŝtupojn nacie kaj internaciskale. Ni ne forgesu ke pere de kulturo oni ankaŭ instruas, informas kaj klerigas homojn.

Ekde organizaj kaj financaj vidpunktoj, ni ankaŭ avancis, niaj estraranoj kaj aktivuloj fariĝis pli bonaj organizantoj kaj kontrolantoj de la enspezoj kaj elspezoj. Nia buĝeto estas pli realisma, pli fruktodona. Dum la periodo, ni vizitis ĉiujn provincojn kaj pli bone kontrolis niajn filiojn. Ni scias kion kaj kiel faras ĉiuj en la diversaj instancoj, kio ebligis kaj ebligas ke nia helpo estu pli, multe pli konkreta kaj celtrafa.

La 2a Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko kronis la fakan agadon de la Asocio. Dum pluraj monatoj, ties gvidantoj cirkuleris, kunordigis, instigis kaj invitis la esperantistojn pretigi prelegojn por partopreni la eventon. Pli ol kvardek fakuloj sesiis en la muzeo pri sciencoj Carlos J. Finlay, la 16an kaj la 17an de majo por interŝanĝi spertojn kaj laboropiniojn pri medicino, sociologio, instruado, komputado kaj alispecaj temoj. Laŭ nia takso, la Seminario estis tre sukcesa.

Ni bonvole petas al niaj fakuloj tra la lando ne entirkestigi tiun sciencan emon. Ni faru sciencon el nia ĉiutaga laboro kiel profesiuloj kaj dividu ĝin kun niaj samideanoj, ni serĉu sciencon en fakaj literaturaĵoj por disvastigi ĝin kadre de la Asocio, cele al pliriĉigo de la faka laboro. Ju pli ni semos la scienteknikan kampon des pli serioza kaj riĉenhava estos nia ekzisto kiel asocio.

Oftaj kontaktoj kaj kunsidoj kun ŝtataj kaj registaraj funkciuloj en diversaj instancoj plifortigis niajn publikajn rilatojn, ĉefe kun la eldonejo José Martí, la Kuba Instituto pri Libro kaj la Ministerio pri Kulturo, kiuj estas niaj rilatorganoj. Ili helpis, helpas, kaj helpos nin laŭeble kaj ni sentas nin pli solidaj kaj firmaj kun ilia helpo. Ni tenu viglaj tiujn rilatojn ĉar ili krom subteni nin, montras sin tre pespektivaj.

Niaj internaciaj rilatoj pliriĉiĝis dum nia dekok jara vivo, reprezentantoj de KEA partoprenis la 81an Universalan Kongreson en Prago, Ĉehio, kaj aŭdigis siajn voĉojn kaj vidpunktojn en diversaj tribunoj de tiu pinta kaj grava evento. Ili ankaŭ vizitis Germanion kaj okazigis renkontiĝojn kun la tieaj esperantistoj. Niaj rilatoj kun Universala Esperanto Asocio, alilandaj asocioj, kun ILEI kaj aliaj fakaj institucioj, tre bone fluis. Amason da leteroj kaj periodaĵoj ni ricevis kaj sendis.

Dum la periodo analizita, vizitis nin esperantistoj el Italio, Koreio, Brazilo, Norvegio, Belgio kaj Germanio, kiuj ne nur restis en la ĉefurbo sed ankaŭ vojaĝis tra la lando. Sendube, ili alportis la mesaĝon de siaj asocioj kaj kluboj, igis nin pli utiligi Esperanton kaj stimuli la novajn membrojn pli kaj pli lerni la lingvon vidinte kiom multe funkcias la afero.

Neforgeseblajn spurojn, ni lasis en iliaj koroj per nia komunikemo, gastigemo, optimismo kaj entuziasmo. Pere de niaj internaciaj rilatoj, ni montris niajn principojn kiel kubanoj kaj la realon de nia socio, ni defendis nian pozicion kiel lando, kiu luktis kaj luktas por pli bona socia ordo. Ĝuste pro tio, multaj alilandaj esperantistoj montris sin solidaraj kun nia agado dezirante al ni sukceson en nia batalo.

Karaj samideanoj:

Mi certas ke mi ne menciis aliajn gravajn aspektojn kaj detalojn de nia laboro, sed la tempo je mia dispono jam fariĝas iom longa.

La estonteco staras antaŭ ni kun novaj taskoj kaj defioj. Ĝi estas tute promesplena. Ni laboru pli serioze kaj harmonie por minimumigi niajn mankojn kaj plenumi niajn plej superajn celojn, konsciante ke ne eblas perdi tempon kaj ke ĉiuj manoj estas trezoraj por puŝi la asocian ĉaron. Ni lernu aŭskulti ĉies opiniojn, evitu sensukajn diskutojn kaj glatigu niajn mildajn kontraŭdirojn. Ni flegu la sanon de tiu ĉi bela familio kiun ni kreis dum dek ok jaroj. Ni laboru por prestiĝigi ne nur nian Asocion sed ankaŭ nian landon. Ni disvastigu kaj utiligu Esperanton kaj eduku niajn membrojn al tutmonda konscio kiel decas al nuntempaj bonaj esperantistoj.

Mi certas ke tiuj kiuj tenis kaj tenas la verdan standardon dum pli ol cent jaroj de nia historio, fieris, fieras kaj fieros pri nia aktiva laboro.

Ni laŭdu la majstron per nia agado. Ni laŭdu la sennombrajn esperantistojn, kiuj

laboris por la progreso de la Zamenhofaj idealoj.

Ni esprimu niajn plej elkorajn dankojn al ĉiu esperantisto kiu donis siajn manojn, sian liberan tempon kaj parton de sia vivo por ke la kuba esperantista movado estu pli sukcesa.

Vivu la Internacia Esperanto-Komunumo!
Vivu nia kara Kuba Esperanto-Asocio!

Dankon!

## OMAĜO

Al KEA pro sia 18jariĝo

Jaron dekokan kun sama entuziasmo
pri la lingvo kaj idealoj ni, travive
tra ŝtormoj kaj kirlegoj stiras gvide
la ŝipon asocian preter marasmo.

KEA fondiĝis el feniksaj cindroj
pere de am', laboro kaj talento,
nek baroj nek la frido de la vintroj
bridis nian agadon. La talento

de nia konvinkiĝo pri la utilo
kaj bona ben' de lingvo internacia
sigelis nian vivon kiel ligilo,
kiel amindumo paca kaj poezia.

La bela sonĝ' de l' majstro Zamenhofa
ĉe ni realiĝis, nia estas familio.
Ĝi vibras en ĉiu regalo strofa
kiun mi verkas. Omaĝa poezio

al sindediĉo, persisto kaj kreo,
lukto pacienca cele al la futuro,
ĉar nin neniam haltigos la veo,
ni estas la konstruantoj de lumturo.

Dum ĉi tiu festa tag' ni ne forgesu
tiujn kiuj fizike forrabis la morto
pura larmo el la kor' ilin karesu
ŝvebas ilia glor' super nia sorto.

Memoroj gloraj nin ĉiujn edukis
seminarioj, renkontiĝoj, festenoj
ĉe ni la 75a UK kondukis
nian samideanaron al edenoj.

Edenoj de emocio kaj granda amo
nestantaj en niaj koroj verve-trile
ili estas nia plej sanktega flamo
kiun ni nutru daŭrigante brile

la laboron de ĉiuj niaj pioniroj
tiuj kiuj preter obtuzaj kritikoj
por nia labor' fariĝis inspiroj
pro siaj saĝaj pensoj kaj taktikoj.

Jes! Pri la nuno kaj pri la morgaŭo
ni okupiĝu per kora energio
tiel ke ili fariĝu en la baldaŭo
la konkretiĝo de nia iluzio.

En tiu solena, emociplena hor'
alten ni levu la voĉon komunan
batu tre maltrankvile nia kor'
dum ni plenumas la celadon nunan.

KEA estas nia plej bela standardo
helas ĉe ni sia historio pura
KEA fariĝu por ni l' plej sankta ardo
de kverko fruktodona kaj matura.

Sur ĉi tiu land' ĉiam Esperanto floru
por ĉiam flirtadu tiu nobla espero
la barojn de la vojo ni traboru
lumu KEA kvazaŭ suno sur nia tero.

Sen timo al estontec' ni kune iru
per vol' komuna kaj firmeco roka
la tuta mondo pri nia agado miru
por ni ne gravas la defio provoka.

Frataro nia, ek al la laboro
ni semis gaje nian aman planton
ĝi estu ĉiam nia komuna trezoro
el nia gorĝo ĝi tiru novan kanton.

KEA, ni trenos vin ĉiam avance
al la batal' kaj el la portepeo
la spado de nia fido kvazaŭ lance
detruos la defetismon de la feo.

Ankaŭ omaĝas vin ĉi tiu palaco
ĉiu membro via estas monumento
al vi, damo ĝentila kies graco
vibras kun ĉiu kareso de la vento.

Gratulojn, KEA! Ni ĉiuj kune festas
vi estas por ni la plej belega flor'
niajn vestaĵojn el glor' por vi ni vestas
ĉar certe vi ĉiam restos en nia kor'.

Juan Lázaro Besada Toledo
Havano, 1997.06.14

# Havano vokas

| HORO UTC | M | KHZ | REGIONO |
|---|---|---|---|
| 7.00 | 31 | 9820 | Okcidenta, Norda Ameriko kaj Pacifika Azio |
| 15.00 | 25 | 11760 | Tuta Ameriko kaj Karibio |
| 19.30 | 21 | 13715 | Eŭropo kaj Mediteraneo |
| 22.00 | 21 | 13715 | Eŭropo kaj Mediteraneo |
| 23.30 | 25 | 11760 | Tuta Ameriko kaj Karibio |
| | 49 | 6070 | |

Dum la nuna jaro, la E-redakcio daŭre disaŭdigis sian duonhoran programon kun variaj informoj pri Kubo, pri la movado kaj korespondinformoj diversaj. Ni pli sentis ke oni aŭdas nin ĉi kontinente kaj ankaŭ en Eŭropo.

Ĉi septembre, la E-redakcio fariĝos 9-jara kaj menciindas ke, pli kaj pli, nia elektronika poŝto funkcias. Esperebłe en baldaŭa estonteco ni starigos retpoŝtan novaĵservon en Esperanto.

Dankon al ĉiuj radioamantoj kaj al amiko Bruno Masala kaj AERA, kiuj konstante laboras per diversaj iniciatoj, instigante la esperantistojn skribi kaj subteni la E-fakon en Radio Havano.

**Maritza Gutiérrez González**
**RHK-Redaktorino**

# Resumen de UNIVERSO

Tal como estar informado es un derecho de todos, informar es un deber de quienes tienen esa responsabilidad. No basta solo con nuestro quehacer diario: es imprescindible, también, dejar constancia de lo realizado, y mantener una divulgación sistemática de actividades futuras, planes y perspectivas. **Universo** nace, precisamente, para informar a la prensa, organismos, instituciones y público en general, acerca de cuanto acontece en el mundo esperantista, particularmente en nuestro país.

Mediante este boletín, a partir de hoy, KEA difundirá todas las informaciones que sea capaz de generar; propiciará el contacto directo con los medios de difusión masivos; posibilitará a estos propagandizar y ampliar conocimientos sobre cualquier tema referido al Esperanto; permitirá la intercomunicación con los desconocedores del idioma; y, sin dudas, continuará incrementando la cifra de seguidores de esta lengua en todo el país.

En cuanto a objetivos, **Universo** nace con numerosos antecesores, aun desde principios de siglo (aspectos de nuestra historia en compañía del Esperanto también encontrarán cabida aquí). El último exponente, en español, fue **KEhAcer**, preparado por este redactor entre 1991 y 1992.

Valgan estas palabras de presentación para dejar abierta una nueva tribuna del Esperanto en Cuba, la cual se suma a las que, desde hace varios años, ven la luz en esta lengua: **Avanco** (se lee *Avánso*), órgano oficial de la Asociación; **La Noktuo** (léase *La Noktúo*), boletín de información; y las emisiones semanales en **Radio Habana Cuba**, para todo el planeta. Localmente, existen numerosos ejemplos. De ellos, hablaremos algún día aquí.

Solo estaremos satisfechos de nuestro **Universo**, cuando se logre que la información acerca del Esperanto esté siempre al alcance de todos.

**(Tomado de *UNIVERSO* Nro. 1, enero-febrero/1997, página 1.)**

# APRENDA ESPERANTO EN 24 LECCIONES

Tomando en consideración el gran interés mostrado por muchas personas, a lo largo y ancho del país, y dadas las restricciones impuestas por las condiciones materiales de todos conocidas, la Asociación Cubana de Esperanto (KEA) brinda la opción de aprender este idioma mediante CURSO POR CORRESPONDENCIA. Pueden acogerse a él todos los residentes en el territorio nacional, según las indicaciones que siguen. Quien esté interesado, debe solicitar su matrícula a:

| | | |
|---|---|---|
| **Curso por Correspondencia**<br>Aptdo. 5120, Cp. 10500<br>Ciudad de La Habana | *o* | Vista Alegre 264<br>e/. J.B. Zayas y Luz Caballero<br>Cp. 10500, C. de La Habana |

y, a vuelta de correos, recibirá las instrucciones y la planilla de inscripción, la cual debe llenar cuidadosamente y enviarla a la dirección que se le indique, según la provincia donde resida, junto a un giro postal por valor de 15 pesos, cantidad que incluye la cuota anual como miembro de la Asociación ($ 6.00) y el derecho a recibir las primeras 4 lecciones, además del ejercicio de control de la primera unidad.

Una vez estudiadas las lecciones y realizado el ejercicio, se enviará este a la dirección que se le haya indicado, para su corrección, más un giro por 8 pesos (el importe de las siguientes 4 lecciones y la prueba). Tal intercambio se repetirá hasta completar el curso de 24 lecciones (6 unidades de 4 lecciones cada una). Además, los matriculados podrán adquirir casetes con la grabación del curso, mediante correo certificado, o personalmente, en las diferentes provincias del país.

Quienes realicen exitosamente el ejercicio final, recibirán un diploma acreditativo y estarán en condiciones de incorporarse a las actividades de los clubes y filiales de la Asociación en los lugares donde estos existen o de formar nuevos clubes, si así lo desean.

Esta convocatoria es válida permanentemente. Para cualquier aclaración adicional, los interesados pueden dirigirse a las direcciones arriba indicadas o llamar a los teléfonos 401364 y 404484; en todos los casos, correspondientes a la sede de la Oficina Central de KEA.

**(Tomado de *UNIVERSO* Nro. 1, enero-febrero/1997, página 4.)**

# NOTIBREVES...

ENTRE el 25 y el 27 de abril, un numeroso grupo de esperantistas capitalinos disfrutaron, junto con familiares y amigos, de los beneficios que ofrece el campismo popular en la base Las Caletas...

**FAVORABLE acogida recibió el trabajo "Posibilidades del Esperanto como lengua de traducción", presentado por Maritza Gutiérrez, secretaria general de KEA, en la Conferencia de Traducción e Interpretación, efec-tuada a finales de abril, en la sede de la Asociación Canaria de Cuba, bajo el auspicio de la Editorial José Martí y otras instituciones...**

EL 31 de mayo quedó inaugurada la sede de la Asociación Cubana de Esperanto en Centro Habana (Neptuno 210, entre Industria y Amistad), donde ya se realizan varias de las actividades propias de nuestro movimiento...

**COMO saludo al XVIII aniversario de la Asociación Cubana de Esperanto (fundada oficialmente el 16 de junio de 1979, en La Habana), se celebraron encuentros entre esperantistas en todas las provincias y el Municipio Especial. La festividad central se desarrolló en la sede de KEA en Centro Habana, con una nutrida asistencia de esperantistas capitalinos e invitados, entre ellos Jacinto Granda, vicepresidente del Instituto Cubano del Libro...**

CAMAGUEY recibió a esperantistas de diversas partes del país, en el encuentro nacional que se efectuó en la tierra de los tinajones, el ultimo fin de semana de junio...

**YA se preparan condiciones para los próximos encuentros nacionales de KEA en lo que resta de año: Sancti Spíritus (septiembre) y Guantánamo (diciembre)...**

PRECISAMENTE para el último mes del año está previsto el simposio **Fernando Ortiz y el Esperanto** que, acerca de las lenguas en las relaciones internacionales, se efectuará, en la sede de la Asociación Cubana de Naciones Unidas...

***AVANCO*, a partir del número de agosto, incluirá un suplemento adicional de cuatro (4) páginas, en español, bajo el nombre *Resumen de Universo*, en el que se incluirán algunos materiales publicados en las últimas ediciones de este boletín. (Claro, *AVANCO* es una publicación cuatrimestral y *UNIVERSO*, bimestral, con 16 y 4 páginas, respectivamente.) Por tanto, el órgano oficial de KEA comenzará a ver la luz con 20 páginas. Y hablando de *AVANCO*, espere en la segunda entrega de 1997, el índice por edición de todo lo publicado por nuestra revista en sus 8 años de existencia.**

**(Tomado de *UNIVERSO* Nro. 2/97, página 4.)**

## De nuestra historia...

Las primeras manifestaciones del Esperanto en Cuba datan de principios de siglo. Entre los difusores más importantes del período inicial se encontraba el sabio cubano Fernando Ortiz.


***

El trabajo coordinado de KEA y la Editorial José Martí ha permitido la publicación de varios títulos en Esperanto; entre ellos, **La historia me absolverá**, de Fidel Castro.

**(Tomado de *UNIVERSO* Nro. 1/97, página 2.)**

# SÍ, TAMBIÉN EN CIENCIA Y TÉCNICA

Con más de 30 ponencias, agrupadas en 5 temas centrales, sesionó exitosamente el II Seminario Nacional sobre la Aplicación del Esperanto en la Ciencia y la Técnica (SAEST'97), que reunió en la capital a más de 50 seguidores de esta lengua en 9 provincias.



Conferencias generales sobre Ciencia y técnica en Esperanto, Hombre y sociedad, Medicina, Enseñanza, y Mercado, comercio y turismo, abarcaron la totalidad de los trabajos presentados y discutidos en el evento, efectuado en el museo de ciencias Carlos J. Finlay, durante los días 16 y 17 de mayo.

Temáticas de continuidad, nuevos proyectos de investigación, presentación de resultados, clases magistrales, mesas redondas,... constituyeron muestras palpables del amplio horizonte en el que también se abre paso la lengua creada por Zamenhof, la que durante más de 100 años ha demostrado su vitalidad, y hoy es capaz de adentrarse en los más intrincados mundos de la vida moderna.

La cita, hasta ahora concebida con carácter nacional, se vio enriquecida con las intervenciones y criterios de Wilhelm Luttermann, esperantista alemán radicado en Francia, quien días antes arribara a nuestro país, con el objetivo de establecer contacto con los seguidores de este idioma en la Isla, y conocer de cerca al pueblo cubano, en correspondencia con sus motivaciones como miembro de la organización internacional Colectivo de Esperantistas Comunistas (KEK).

El evento rebasó las expectativas: superó con creces los resultados de la anterior edición (1995), en número de temáticas, cantidad de trabajos, ponentes y participantes, lo que representa un nuevo reto para la Asociación Cubana de Esperanto en marcha hacia el 2000, año para el que se prevé la realización del próximo SAEST, encuentro de esperantistas cubanos en compañía de la ciencia y la técnica.

**(Tomado de *UNIVERSO* Nro. 2, marzo-junio/1997, página 1.)**

**UNIVERSO** Boletín bimestral (en español) de la Asociación Cubana de Esperanto
Redactor: Juan Ramón Rodríguez Gómez

Para cualquier información, dirija su correspondencia a: Vista Alegre 264 e/. J. B. Zayas y Luz Caballero, Víbora, CP 10500; o llame a los teléfonos **40 4484 ó 40 1364**

# MOZAIKE

## CENTRA KOMISIONO AKTIVAS

La hotelo de la Popola Potenco en Sancti Spíritus gastigis la trian eldonon de la renkontiĝo de la Centra Komisiono, aprilo 25an kaj 26an.

Ĉefaj celoj de la evento fokusiĝis al kontrolo de interkonsentoj de la pasintjara sesio, analizo pri la nunaj agadoj kaj strategio en la venontan periodon.

Partoprenis reprezentantoj de Villa Clara, Cienfuegos, Sancti Spíritus kaj municipo Morón (Ciego de Avila); reprezente de la Nacia Estraro, iris tiu ĉi redaktoro.

La aranĝo estis sukcesa el ĉiuj vidpunktoj kaj montriĝis, unu plian fojon, la pintaj rilatoj kun la registaraj instancoj kaj la organizemo fare de José Luis Montes de Oca kaj Norberto Díaz.

Oni interkonsentis sendi informojn, inter ili biografion de Zamenhof, al la Urba Historiisto kaj la loka esperantistaro, celante nomumi parkon tiean L. L. Zamenhof.

Internacian karakteron donis al la kunsido la partopreno de S-ro. E. Raats.

## INSTRUISTOJ LERNAS

Ege sukcese sesiis la 6a Nacia Seminarion por Instruistoj en la kuba E-Domo, **la 4an kaj 5an de julio 1997.**

Ĉi tiu evento iom malsimilis la antaŭajn, pro la fakto ke ĝi estis pli aktiva, t.e., ne nur konsistis el prelegoj, sed ĉefe kiel metiejo kaj tio permesis ke la programo estu pli enhavriĉa.

Oni aprobis la kvotojn laŭ provincoj konsiderante la ecojn aktivi kaj regi la lingvon; ĉeestis la Seminarion reprezentantoj el ok provincoj: Guantánamo, Santiago de Cuba, Granma, Camagüey, Ciego de Avila, Villa Clara, Matanzas kaj Ciudad de La Habana

## KEA EN INTERNACIAJ EVENTOJ

Post detala analizo pri financaj rimedoj kaj aktivemo de estraranoj (je ĉiuj niveloj), oni alvenis al la konkludo ke, pro la altaj kostoj de la 82a UK de Adelajdo, Aŭstralio, nur iru la KEA-prezidanto, Julián Hernández, kiu reprezentis nin tie sukcese.

Tamen, eblis reprezentiĝo nia en aliaj eventoj. Tiucele, Maritza Gutiérrez, nia ĝenerala sekretario, ĉeestis 56an Hispanan Kongreson kaj la 7an Europan Kongreson, ambaŭ okazintaj en Valencio.

La estrarano de la instrua fako, Héctor Jiménez, helpate de la meksika movado, vojaĝos al tiu lando por regiona renkontiĝo.

Alia kubano, Pedro Peña (Santiago de Cuba), vojaĝos al Italio kaj Belgio subtenite de esperantistoj el tiuj landoj.

# Ok jara indekso de AVANCO

*Juan Ramón Rodríguez Gómez*

Por plifortigi la propagandon de la Asocio kaj ĝian informan laboron, la 16an de junio 1989 aperis **AVANCO** -oficiala organo de KEA-, kies celo estis oferti al nia esperantistaro umbilikan ligilon, nutrivan kaj dinamisman; kaj, de tiam, ĝi fariĝis bildo kaj tribuno pri la kuba esperanto-movado, pere de kiu KEA diskonigis sian agadon. Do, validas jam resumi tiun laboron laŭ ciferoj per indekso.

Dum ok jara vivo, **AVANCO** aperis 15 fojoj: 1989 (1), 1990 (3), 1991 (2), 1992 (1), 1993 (1), 1994 (1), 1995 (2), 1996 (3), 1997 (1, ĝis la lasta numero, kiu fermis la okan eldonjaron). Ĉiam aperis 16 paĝa, escepte la numeroj 1/89 (20) kaj 2/91 (8).

Kelkfoje, oni indikis "monata", "trimonata", "kvarmonata", ... tamen aperis neregule; nur ekde 1996, **AVANCO** reguliĝis kiel kvarmonata gazeto. Mi esperas ke tiu situacio daŭrigu tiel, malgraŭ nuntempaj kaj estontaj malfacilaĵoj.

Intertempe, validas prezenti tutan indekson de la oficiala organo de KEA. Pere de tiu ĉi kompilo, mi deziras rekoni, dankegi kaj gratuli la laboron de tiuj kiuj ebligis la aperon de **AVANCO** dum ok sinsekvaj jaroj.

Ĉi-kaze, mi indeksas **AVANCO**-n laŭ la eldonnumero; sed ankaŭ validas prezenti ĝin laŭ aŭtoro kaj fako. Tion mi promesas aperigi en decembro/97 kaj aprilo/98, respektive.


| **AŬTORO** | **TITOLO** | **PAĜO** |
|---|---|---|
| **●Jaro 1a, N-ro. 1 (16an de junio 1989)** | | |
| Gutiérrez, Maritza | Alpasen! | [1] |
| ______ | Ni jubilas! | 3-4 |
| ______ | Inaŭgurita Internacia Esperanto-Centro | 5 |
| S/A | Ĉe sidejo de trobadoroj | 5 |
| — | 74a UK en Brajtono | 5 |
| Rodríguez, Juan Ramón | Unua Esperanto-Festivalo | 5 |
| Fernández-Calienes, A. | 22a Konsultiĝo de SLEAJ | 6 |
| Kuba Esperanto-Asocio | Konkurso "Deka Datreveno" | 6 |
| S/A | Fotoekspozicio | 6 |
| — | Esperanto en Radio | 7 |

| AŬTORO | TITOLO | PAĜO |
| --- | --- | --- |
| S/A | Regionaj kongresoj | 7 |
| —— | Eĥoj en Bajamo | 7 |
| —— | [Notoj] | 7 |
| Gutiérrez, M. y O. Raola | Radio Havano Kubo | 8 |
| [Redakto-stabo] | Lingve | 9-10 |
| Cardoso, Onelio Jorge | Tosto por Zonzo (trad.: Maritza Gutiérrez) | 11-14 |
| Blanke, Detlev | Kiel organizi sciencan esploron pri E-o? | 15-19 |
| [Redakto-stabo] | Deziras korespondi | [20] |
| **●No. 1/1990** | | |
| Gutiérrez, Maritza | Infloresko | 3 |
| Raola, Orlando | Quivicán, se temi pri avangardo... | 4 |
| S/A | Biografio de la Alta Protektanto... (75a UK) | 5-6 |
| [Redakto-stabo] | Avanckonkurso | 6 |
| Raola, Orlando | Kultura panoramo | 7-9 |
| | -Ne konvinki la konvinkitojn, sed plikonsciigi ilin | |
| | -Trafoliumante *Monato*-n | |
| | -El "Kulturo kaj I.L." de W. Auld | |
| | -Lernu Esperanton! | |
| Gutiérrez, Maritza | Librofoire en Havano | 10 |
| Fernández-Calienes, A. | Kongresa paĝo | 11-12 |
| Otero, Alexis | Se temas pri junuloj... faktoj, ne plu fantazioj | 12 |
| [Gutiérrez, Maritza] | Havano vokas... E-elsendoj de RHK | [13] |
| Akademio de Esperanto | Oficialaj informoj de la Akademio de E-o. | 14-[16] |
| **●Nro. 2/1990 (1an de junio)** | | |
| Gutiérrez, Maritza | Veroj kaj esperoj | 3 |
| Guillén, Nicolás | Havas mi (trad.: Orlando Raola) | 4 |
| Raola, Orlando | Kultura panoramo | 5-7 |
| | -Ni okupiĝas pri E-Kulturo... pri kio do? | |
| | -Ekkonu la revuon Latinamerika Memuaro | |
| | -El "Kulturo kaj I.L." de W. Auld | |
| | -Subtileco de la vortordo | |
| S/A | Havano kongrese | 8-9 |
| [Gutiérrez, Maritza] | Havano vokas | 10 |
| S/A | Profitu, Libroservo atendas viajn mendojn | 11-12 |
| Otero, Alexis | Definitive FAKTOJ, sed... | 13 |
| SUNIDO | Krucenigmo | 14-15 |
| Privat, Edmond | [Frazo] | 15 |

| AŬTORO | TITOLO | PAĜO |
|---|---|---|
| [Redakto-stabo] | Kontaktojn serĉas... | [16] |
| | Avanckonkurso | [16] |
| **●Nro. 3/90 (30an de decembro)** | | |
| Raola, Orlando | Mateniĝo post la verda tajdo | 3-4 |
| Rodríguez, Carlos R. | Malferma parolado... [75a UK] (Trad. O. Raola) | 5-9 |
| [Universala E-Asocio] | Kongresa Rezolucio (75a UK) | 6 |
| [Gutiérrez, Maritza] | Havano vokas | 10 |
| Raola, Orlando | Kultura panoramo<br>-En la duan jarcenton movade kaj kulture<br>-Fragmento el "La E-Literaturo: Fenomeno unika" de Giorgio Silfer | 11-13 |
| Otero, Alexis | Analizante la 46an IJK... | 14-15 |
| [Redakto-stabo] | Avanckonkurso | [15] |
| **●Nro. 1/91 (4an de novembro)** | | |
| Raola, Orlando | Por veki eĥojn kaj partoprenon | 3 |
| Jiménez, Héctor | Alvoko al Esperanto-instruistoj | 4 |
| Duc, Michel | La problemo de la normo en Esperanto (ĉe *Kultura panoramo*) | 5-9 |
| [Gutiérrez, Maritza] | Havano vokas | 10 |
| Kuba Esperanto-Asocio | Konkurso "Esperanto: centjara kulturo" | 11 |
| Raola, Orlando | La radetoj | 12 |
| [Redakto-stabo] | Ni salutas la 2an Kuban E-Festivalon (KEF) | 12 |
| Otero, Alexis | Iniciato plenigas vakuon | 13 |
| Piñera, Andrés | Fonetikaj problemoj de la kubaj Esperanto-parolantoj | 14-15 |
| [Redakto-stabo] | Avanckonkurso | 15 |
| Kuba Esperanto-Asocio | El la laborstrategio de KEA por la periodo 1991-1993 | 16 |
| **●Nro. 2/91 (31an de decembro)** | | |
| Raola, Orlando | Spite la ventojn... | [1] k.3 |
| Díaz, Norberto | [Letero al... *La legantoj skribas...*] | 4 |
| Gutiérrez, Maritza | Komunikcela esperantistiĝo: Ĉu motivaro? | 5-6 |
| Boulton, Marjorie | Faktoj kaj fantazioj [fragmentoj, Ĉe *La radetoj*] | 7-8 |
| [Gutiérrez, Maritza] | Havano vokas | 8 |
| **●Nroj. 1-4/92 (31an de decembro)** | | |
| Raola, Orlando | Venke, bonpaŝe kaj malkrokodile! | 3-5 |
| [Redakto-stabo] | Al Kubo tuttempe! | 5 |

| AŬTORO | TITOLO | PAĜO |
| --- | --- | --- |
| [Gutiérrez, Maritza] | Havano vokas... | 6 |
| Gutiérrez, Maritza | Diversloke | 7 |
| S/A | Landa gazetaro: Ni, vi, la aliaj... ĉiuj! | 7 |
| Otero, Alexis | Lasu la lingvon aŭdiĝi! | 8 |
| Gutiérrez, Maritza | Strategio kaj realoj: informa fako | 9 |
| Raola, Orlando | Kultura panoramo | 10-14 |
| | -La lasta deklaro de la esperantistoj | |
| | -Kolokvo "La stato kaj estonteco de la lingvo Esperanto" | |
| Otero, Alexis | Ni semas kaj semas | 14k16 |
| Gutiérrez, Maritza | Kun vojaĝema samlandano (ĉe *La radetoj*) | 15-16 |
| **●Nro. 1/93 (29an de oktobro)** | | |
| Raola, Orlando | Por ne plu sklavi en la ĉenoj de l' muteco... | 3-4 |
| Franklin, Benjamin | La virtoj de Benjamin Franklin (Trad.: O. Raola) | 4 k. 8 |
| [Raola, Orlando] | Kultura panoramo | 5-8 |
| | -Kelkaj konsideroj pri versa tradukado (M. Gutiérrez) | |
| | -Recenzo malofta (O. Raola) | |
| | -Katolika Esperanto-Rondo (G. Morales) | |
| [Gutiérrez, Maritza] | Kvin jarojn persisteme en la etero! (Ĉe *Havano vokas*) | 9 |
| Otero, Alexis | Plejparte novaĵoj! | 10 |
| Juárez, Raúl | Memlerninto memoras... | 11-12 |
| Brozovsky, Joel | Estas facile kuiri per suno! (Ĉe *La radetoj*) | 13-14 |
| Meier, Detlev | Utiligo de Esperanto | 15 |
| Otero, Alexis | KUUK... Solidareco, obstine antaŭen! | 16 |
| **●Nroj. 1-4/94 (15an de decembro)** | | |
| Otero, Alexis | Ni rigardas antaŭen | 3-4 |
| Gutiérrez, Maritza | Havano vokas | 5 |
| ——— | Kultura panoramo | 6-7 |
| | -El la zamenhofa trezorujo | |
| Jiménez, Héctor | Ĉu revo aŭ realo? | 8-9 |
| ——— | Alvoko al Esperanto-instruistoj | 10-11 |
| Otero, Alexis | Ni iras al Camagüey | 11 |
| ——— | Faktoj skribiĝas majuskle | 12-13 |
| ——— | Alia vizito de la Pastroj | [14]-15 |
| Gutiérrez, Maritza | El la Seula Kongreso | 15 |
| Kuba Esperanto-Asocio | Unua Bulteno (Dua Nacia Kongreso) | [16] |

| AŬTORO | TITOLO | PAĜO |
|---|---|---|
| **●Nro. 1/95 (31an de majo)** | | |
| Otero, Alexis | Sukcesa evento sciencteknika | 3-4 |
| Gutiérrez, Maritza | Kultura panoramo<br>-El katakomba flustro kaj venĝa historio | 5-7 |
| Besada, Juan Lázaro | Kial homoj kabeiĝas? | 8-9 |
| Hernández, Julián | Tri neaj respondoj (rilate al *Kiaj homoj...?*) | 9 |
| Rodríguez, Juan Ramón | Jen nia historio<br>-1904-1909: Kvin tiklaj jaroj | 10-12 |
| Gutiérrez, Maritza | Camagüey: Prioritat-fonto | 13 |
| Castro, Martín | KEA jam kvar foje en EXPOLINGUA | 13-14 |
| [Otero, Alexis] | Digna reprezentiĝo [Pedagogio '95] | 14 |
| ________ | Iom for de la ĉefurbo | 14 |
| Díaz, Norberto | S/T (el *Jajabo*) | 15 |
| [Otero, Alexis] | [Noto pri la 16a datreveno de KEA] | 15 |
| ________ | [Noto pri Nacia Seminario por Instruistoj] | 15 |
| ________ | Niaj du delegitoj al Tampereo | 15 |
| Kuba Esperanto-Asocio | Dua Bulteno (2a Nacia Kongreso) | [16] |
| **●VIIa jaro, nro. 2/95 (junio-decembro)** | | |
| Hernández, Julián | Du KEA-anoj en Finnlando | 3-4 |
| Rodríguez, Manuel | Ĉu instruisto aŭ edukisto? (pri *Kial...?*) | 5 |
| Gutiérrez, Maritza | Instigo al leterumado (Ĉe *Havano vokas*) | 6 |
| Otero, Alexis | Steluloj nepre brilas | 7 |
| ________ | Kvakerino ĉe ni | 7 |
| ________ | Por ke Esperanto restu viva | 7 |
| ________ | Por plia profesieco | 8-9 |
| ________ | Datreveno tra la kajmano | 9 |
| Rodríguez, Juan Ramón | Jen nia historio: Rigardo tra kvar jardekoj<br>-1910-1918: La ĥimeraj jaroj<br>-1919-1930: La faktoj parolas...<br>-1931-1947: La estonteco diros | 10-15 |
| Gutiérrez, Maritza | Preparkomitato sin prezentas (2a Nacia K.) | [16] |
| **●VII-a jaro, nro. 3 (1/96, januaro-aprilo)** | | |
| Hernández, Julián | Ni ne rajtas silenti! | 3-[4] |
| Besada, Juan Lázaro | Alvoko al arta kreado | [5] |
| Gutiérrez, Maritza | Havano vokas | 6 |
| Díaz, Norberto | Agu, ne ploru! (pri *Kial homoj kabeiĝas?*) | 7 |
| Otero, Alexis | Sukcesoplenaj (2a Nacia Kongreso kaj 13a Komitatkunsido) | 8-9 |

| AŬTORO | TITOLO | PAĜO |
|---|---|---|
| Orellana, Atilio | Ameriko kongresis en Kostariko | 10-11 |
| Otero, Alexis | KEA organizos la 5an Nacian Seminarion | 12 |
| ——— | Denove du kubanoj en UK | 12 |
| ——— | Sukcesojn, centra regiono! | 12 |
| ——— | Librofoiro mallonge | 12 |
| Rodríguez, Juan Ramón | Jen nia historio: De KEA al KEA | 13-15 |
| | -1948-1957: Vigla propaganda laboro | |
| | -1958-1973: Nova orientigo | |
| | -1974-1978: Preparkondiĉoj al KEA | |
| [Redakto-stabo] | Deziras korespondi | [16] |

**●VIII-a jaro, nro. 1 (2/96, majo-aŭgusto)**

| | | |
|---|---|---|
| Hernández, Julián | Antaŭenigi la movadon | 3-6 |
| Jiménez, Héctor | Bunta kaj utila, laŭ ĉies opinioj | 7 |
| Universala E-Asocio | Manifesto de Prago | 8-9 |
| Hernández, Julián | Intensaj tagoj de niaj reprezentintoj | 10-12 |
| Rodríguez, Juan Ramón | Jen nia historio | 13-16 |
| | -1979-1990: Sukcesoplena epoko | |

**●VIII-a jaro, nro. 2 (3/96, septembro-decembro)**

| | | |
|---|---|---|
| Otero, Alexis | Al kiu grupo vi apartenas? | 3-5 |
| Kuba Esperanto-Asocio | Invito al 14-a Tutmonda Festivalo de Junularo | 6 |
| [Otero, Alexis] | KEA komitatkunsidos en Guantánamo | 7 |
| ——— | Survoje al SAEST'97 | 7 |
| ——— | Se vi pretas pruvi vian verk-kapablon... | 7 |
| Gutiérrez, Maritza | Kelkaj konsideroj (pri tradukarto) | 8-9 |
| Rodríguez, Juan Ramón | Jen nia historio | 10-13 |
| | -1991...: Antaŭen, malgraŭ ĉio | |
| Montes de Oca, José L. | Santo Domingo aktivas | 14 |
| Gutiérrez, Maritza | Havano vokas | 15 |
| Kuba Esperanto-Asocio | Aliĝilo (SAEST'97) | 16 |

**●VIII-a jaro, nro. 3 (1/97, januaro-aprilo)**

| | | |
|---|---|---|
| Gutiérrez, Maritza | Komitatanoj kunsidis en Guantánamo | 3 |
| Kuba Esperanto-Asocio | Estrara Raporto | 4-14 |
| ——— | Ĉefaj taskoj de KEA por 1997 | 14-15 |
| Gutiérrez, Maritza | Komitataj decidoj | 16 |

# ESPERANTO

En 1994, dum la 79-a UK, en Seulo, estis starigita komisiono, kies tasko estas prizorgi la agadon por la IL en Ameriko. De tiu momento fortaj okupoj estis plivastigi la kunlaboron inter la landaj movadoj de la kontinento kaj ankaŭ direkti la atenton al la konservado de la interesiĝo flanke de grupoj kaj izoluloj en landoj sen organizita strukturo aŭ malforta movado.

Tiu burgono bezonas forton por kreskadi, al ili estas necesa enplektiĝo en la Esperanto movado, al kiu ankaŭ vi apartenas. Kiel tion fari? Jen du manieroj por helpi: Subteno al Fondajo Ameriko kaj Starigo de Ĝemelaj Rilatoj, pri kiuj ni parolos en alia momento. Dume, ni inkluzivas la adresojn de ĉiuj membroj de la Komisiono pri Ameriko:

Prof. Juan E. BACHRICH
Apartado 70782
YV-Caracas 1071A
Venezuelo
tel.: + 582 9867118
fakso: + 582 9869183

S-ino Suzanne CARON-RICHER
1104-2625 Regina Street
CA-Ottawa ON
Kanado K2B 5W8
tel.: + 1 613 726 1140
fakso: + 1 613 8204666

S-ro Rubén DIACONU
119 y 122 AR-3700
Pcia R. Saenz Peña, Argentino

## en

Dorothy HOLLAND-KAUPP
5140 San Lorenzo Drive
US-Santa Barbara
CA 93111-2521, Usono
tel.: + 1 805 967 6241

S-ino Symilde SCHENK-LEDON
Caixa Postal 269
BR-Campos do Jordao SP
12460-000, Brazilo
tel.: + 55 122 62 1983

S-ro Juan R. RODRÍGUEZ
Apdo. 5120 CU-10200
Víbora, La Habana, Kubo
tel.: + 53 7 33 8729

S-ro Antonio LEONI de LEON
Apartado 7603
CR-1000 San José, Kostariko
tel.: + 506 231 4167

Leonora TORRES
Playa Hornos 575
Col Marte Del Iztacalco
MX-08830 México DF
Tel.: + 52 5 5791633

UEA-Komisiito:
Atilio ORELLANA ROJAS
Casilla de Correos 1428
AR-5000 Córdova
Argentino

# AMERIKO

Far de JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ GÓMEZ

Ciferecigis: Javier Ramos
@Radioamatoro